Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko 2025 Jarkolekto 12 - Numero 2




-

# *E N H A V O T A B E L O*

## de aprilo 2025


Titolpaĝo………………………………………………………………………..……....  1

Enhavotabelo ……………………………………………………………….. 2

De ni por … ni! ……………………………………………………........ 3

Moneroj & medaloj ………………………………………………….... 5

*115a jubilea datreveno de Esperanto en Gliwice 2024*

*Glivice'a Klubo de Kolektantoj 2024*

*Premio Internacia Bulgara Literatura Konkurso 2012*

*Dekjara rememorigaĵo pri la forpaso de d-ro W. Drees (1998)*

Spikumaĵoj & suplementoj: Radio Polonia/ dezajnoj de J. Strupulis ….. 14

Por spuremuloj! ……………………………………………………….. 15

Aspektoj de numismatiko: Numismatikaj mozaikoj (2)………….....… 17

Valormarkoj & valorbiletoj: Kolektistaj glivicaj kuponoj 2024 …….. 18

Historiaj aspektoj: La Unua Monda Ekspozicio - Londono 1851 ....…. 19

Numismatika Forumo: La ora virbovidego ……………….………. 23

Medalistoj: 38. Alberto González Pereztol………………...……….. 25

El la gazetaro: Medaloj de la klubo "La Verda Stelo" ………..……… 27

Terminaro: Alfabeta listo (41) …………………………………....... 30

Retpoŝto ……………………………………………………………….. 31

Anoncoj & eventoj ……………………………………..………… 37


***Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)***


Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Komputilaj konsiloj: Maarten Boon
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be

Retejoj:http://ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto

# D E  N I  P O R  . . .  N I!

***"Por aŭtentikaj mondcivitanoj internacia lingvo estas nemalhavebla interhoma komunikilo. Por fispecaj potenculoj sufiĉas tamen rudimenta lingvo kies bazaj vortoj, kiel koloniismo, subpremado, diktaturo k.a. estas satelitovortoj de konceptoj kiel NUMENO kaj PROFITO."***
**(Anonimulo)**

Ĉu tiu "anonimulo" eble estis Zamenhof mem? Tre probable ne, sed li, se vivunte nun, tamen konsentus, ĉar pacema humanisto, bonkora, aŭtentika "homo sapiens sapiens" li sendube estis.


Renato kun lia kara Anna

Tia estis ankaŭ nia karmemora Renato Corsetti (1941-2025), kiu antaŭ nelonge forpasis. Li, por lia familio, liaj geparencoj, geamikoj kaj gesamideanoj postvivos enkore kaj enmemore. **Kiel esperantisto kaj humanisto li do certe meritus esperantan memorigan medalon!** Sendube estus plaĉinta al Renato – kiel li oftege emfazis en leteroj al ENA –, ke ni disvastigu pozitivajn novaĵojn, ankaŭ por numismatoj, **kiel pri baldaŭa esperanta honora medalo por li…**

El la pola urbo Glivice, loĝloko de nia ENA-membro kaj kontribuanto de nia revuo, Stanislavo Mandrak, okaze de la tiama 115a (!) jubilea festo en 2024 de loka glivicea kolektantista fakgrupo venis mencio pri la eldono de memormonero kun stelo-valoro!

En la sama urbo ankaŭ tiuokaze aperis neordinara blanka kolektista medalo kun ŝtala bazo kaj polikromaj surfacoj, laŭdire kreitaj pere de iu ege moderna UV-radia procedo. Ambaŭ, la monero kaj la medalo, estas montritaj kaj detale priskribitaj en ĉi numero.

La dua novaĵo rilatas al **unika esperanta numismatika evento**, nome la kreado de rarega numismatikaĵo, ne nur rarega en Esperantujo, sed ankaŭ sufiĉe rara en la historio de la mondvasta numismatiko. Post la lanĉado (antaŭ kelkaj jaroj) de du arĝentaj medaloj kun stelo-valorindikoj, por honori du pionirojn de nia numismatiko, respektive Ferdinand de Saussure (spesmila sistemo) kaj Julia Isbrücker (stelo-sistemo, kune kun Andreo Cseh), nia membro, numismato kaj ĵurnalisto, Walter Klag el Vieno, kune kun lia edzino Renate, lanĉis antaŭ nelonge la unuan esperantan moneron (aŭ "pagmedalon") realigitan en la nobla metalo **"plateno"**, sufiĉe rara metalo, eĉ en la ĝenerala numismatiko (***vidu: Anoncoj kaj Eventoj!***).

Laste, sed certe ne balaste, sur la venonta paĝo ni celas atentigi niajn legantojn – **kaj unuavice la kunlaborantojn de asociaj estraroj** – pri nia rekomendinda strategio por realigi mem, preskaŭ tute senriske, la kreadon kaj vendadon de novaj esperantaj moneroj kaj medaloj!!!

Bert

*Koncerne la supran citaĵon, jen rekomendinda legado: "La danĝera lingvo" (1988) de Ulrich Lins!*

## *Per jena strategio ĉiu esperanta asoci(et)o preskaŭ senriske sukcesos eldoni "eternan" memorigan moneron aŭ medalon!!!*



1. Unuavice fiksu maksimuman buĝeton.
2. Nur per skribaj **antaŭmendoj** kaj sekve **antaŭpagoj** vi ne riskos perdi monon! (Menciu tiujn kondiĉojn en viaj anonco aŭ informilo!)
3. Serĉu adresojn de medalistoj kaj firmaoj per Interreto aŭ pere de artaj akademioj aŭ numismatikaj asocioj en viaj urbo, regiono …
4. Skizo (= unua dezajno): ***priskribu*** antaŭ via unua vizito al medalisto aŭ firmao kaj malnete mem ***skizu*** la averson (kaj la reverson de duflanka medalo).

   Ekzemple (averso)

   - *ende*: ĉirkaŭskribo kun teksto koncerne la eventon + jarindiko(j)
   - *eble*: steleto esperanta + stiligita bildo de monumento aŭ urba objekto, oficiala emblemo ktp.
   - *eventuale*: valorindika mencio sur eventuala memor*monero*
   - *laŭ propra intenco*: kion ajn vi mem volas krome aldoni…

   Ekzemple (reverso)

   - reverse, eventuale: io tipa pri via asocio, kiel blazono, bildo de pioniro ktp.
5. Demandu, kiom kostus eventuala profesia (dezajnenda) skizo, **eĉ se vi tamen poste ne akceptus** la kondiĉojn de la vendisto. (Ĉu eble senkosta, *se vi konsentus*!?)
6. Por la materialo (ekz. metaloj) vi decidu, nur **post kiam** la firmao prezentis al vi la prezojn de diversaj metaloj por la sama kvanto kaj la samaj diametro kaj pezo.
7. Kvanto: prefere (vi mem decidu!) inter 20 kaj 40 ekzempleroj. Se vi ekzemple intencas mendi 30 ekzemplerojn, surbaze de la ŝuldota sumo antaŭe kalkulu la vendoprezon de *unu ekzemplero*. Tiel vi scios, kiom da ekzempleroj vi devas vendi, por sukcese repagi almenaŭ la kostojn. **Ĉiu ekzemplero krome vendota signifos nur profiton!**
8. **Kontrolu!**
   Atente pristudu kaj kontrolu **en la antaŭlasta fazo** la detalojn de via dezajno, ankaŭ la surskribojn kaj jarindikojn. Mi mem posedas ekzempleron de honora medalo por Ivo Lape**nn**a, kun nur unu litero "n" en lia familia nomo!

**Sukceson! Nepre kontaktu ENA-n, se io estus ne tute klara por vi: *bert.boon@skynet.be***

## Tipo A1 - Esperantaj moneroj

### 115a jubilea datreveno de Esperanto en Gliwice 2024



① ② ③ ④ ⑤

①




| | |
|---|---|
| Lando: Pollando | Kvanto: 25 |
| Metalo: kupro | Pezo: 5,78 g |
| Diametro: 23 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 2024 | Diko: 1,5 mm |

### Averso:

supre, ĉirkaŭe; "• 115 L A T E S P ERANTO W GLIWICACH •"

meze; bildo de Hotel Victoria

sube: "HOTEL VICTORIA" + **GKK**= "Glivice'a Klubo de Kolektantoj"



### Reverso:

supre, meze: kvinpinta (esperanta) stelo

ambaŭflanke de tiu stelo: 1909 2024

sub la stelo: "25 STELOJ"

②







Lando: Pollando

Metalo: latuno

Diametro: 23 mm

Jaro: 2024

Kvanto: 25

Pezo: 5.59 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

**Averso + reverso: kiel ①**

③







Lando: Pollando

Metalo:aluminio

Diametro: 24 mm

Jaro: 2024

Kvanto: 25

Pezo: 5,33 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2,5 mm

**Averso + reverso: kiel ①**

④






Lando: Pollando

Metaloj: latuno + kupro

Diametro: 24 mm

Jaro: 2024

Kvanto: 50

Pezo: 5,65 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1,5 mm

**Averso + reverso: kiel ①**

⑤






Lando: Pollando

Metaloj: kupro + latuno

Diametro: 24 mm

Jaro: 2024

Kvanto: 50

Pezo: 5,62 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1,5 mm

**Averso + reverso: kiel ①**

## Rimarko 1:

variantoj 4 kaj 5 estas dumetalaj. Ĉe 4, la ekstera strio (kolumo) estas el latuno, la centra parto el kupro. Ĉe 5, la ekstera bendo estas kupra, la centro latuna.

## Rimarko 2:

Produktitaj de firmao KiM  Iwona  i  Grzegorz  Gacek

## Rimarko 3:



“Hotelo Victoria” en Glivice




***La redakcio de ENA tutkore dankas nian membron Stanislaw Mandrak pro liaj nemalhaveblaj helpo kaj subteno.***

***Kromaj informoj kaj eventualaj mendoj ĉe: [stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)***

## Tipo A2 - Esperantaj medaloj

Glivice'a Klubo de Kolektantoj 2024







| | |
|---|---|
| Lando: Pollando | Kvanto: 24 |
| Metalo: ŝtalo *(vidu "Rimarko 2" !)* | Pezo: 90,72 g |
| Diametro: 70 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 2024 | Diko: 3 mm |

**Averso:**

ĉirkaŭe, supre: "POLSKI ZWIĄZEK ESPERANTYSTÓW ODDZIAŁ GLIWICE"
"Pola Esperanto Asocio Filio Gliwice"

meze: polikroma urba blazono de Glivice, parte-sube: kovrita de verda esperanta steleto kun meze litero E

sube: "Glivice'a Klubo de Kolektantoj"
★"GLIWICKI KLUB KOLEKCJONERÓW"★

**Reverso:**

ĉirkaŭe, supre: "115 LAT ESPERANTA W GLIWICACH"
meze, ambaŭflanke: (verda) steleto
ĉirkaŭe, sube: "115 DATREVENO DE ESPERANTO EN GLIVICE"
meze: surskriboj rektangulaj: "115 LAT ESPERANTA W GLIWICACH"
"1909 – 2024"
senkolora urba blazono + supre "WYSTAWA"
dekstre: busto de Zamenhof
nigra stelo kun litero E
"06.06.2024 GLIWICE 1"

### Rimarko 1:

Supre, meze: trueto, probable por ebligi pendigon de la medalo per ŝnureto

### Rimarko 2:

Produktinto: Wikoss – Sport z Będzina (***laŭ UV - procedo sur ŝtala disko)***

## Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Premio Internacia Bulgara Literatura Konkurso 2012



| | |
|---|---|
| Lando: Bulgario | Kvanto: 3 |
| Metalo: latuno | Pezo: 1093 g |
| Mezuroj: 190 x 130 mm | Medalisto: Bogomil Ĵivkov |
| Jaro: ĉirkaŭ 2011 - 2012 | Diko: 18 mm |

***Averso:***

sur la supra, maldekstra parto estas modlita fluganta birdaro, kies formoj eliras de la kadro de la plaketo.
Sur la malsupra parto estas modlitaj arbaj branĉoj kaj du birdoj vid-al-vide.
En la libera spaco de la plaketo estas skribita per reliefaj literoj la surskribo:

NI SEMAS
KAJ SEMAS
NENIAM LACIĜAS
PRI L'TEMPOJ
ESTONTAJ
PENSANTE
L.L.ZAMENHOF







***Rimarko 1:***

La plaketo estis kreita kiel premio por la Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov – Hrima", Sofio, 2012

***Rimarko 2:***

Fotografaĵo pri la gajninto de la konkurso, plaketo enmane.
Teksto sub la foto:

*"Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov – Hrima" Sofio – 2012*
*Georgi Mihajlov – tria premio pro artikolo"*

## *Literatura konkurso "Hristo Gorov – Hrima"*



***"En 2020 Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) la sepan fojon organizis la tradician internacian Esperantan literaturan konkurson "Hristo Gorov – Hrima". La konkurso estas tradicia kaj en ĝi partoprenas Esperantaj aŭtoroj el diversaj landoj. Ĉi-jare en la konkurso partoprenis Esperantaj verkistoj el Brazilo, Francio, Irano, Kongo, Rusio, Litovio, Ĉeĥio, Turkio, Germanio, Rumanio, Italio, Britio, Tanzanio, Tajvano, Armenio, Pollando, Slovakio, Ukrainio, Nov-Zelando, Bulgario. Ili sendis 17 rakontojn kaj 8 eseojn.***

***La organizanto de la konkurso estas Maja Gorova, vicprezidanto de BEA, filino de Hristo Gorov. La ĵurio: Georgi Mihalkov, Laure Patas d'Illiers, Venelin Mitev."***



Willem Drees (naskiĝis la 5an de julio 1886 en Amsterdamo, mortis la 14an de majo 1988 en Hago) estis nederlanda politikisto de la Socialdemokrata Laborista Partio kaj ĉefministro de Nederlando en la epoko 1948–1958. Oni konsideras lin unu el la plej gravaj postmilitaj nederlandaj politikistoj. Sub lia gvido realiĝis la senkoloniigo kaj la post-milita rekonstruado de Nederlando. Drees estis konvinkita socialdemokrato, sed tamen tre pragmata:

***"Ne ĉio eblas, kaj certe ne ĉio samtempe."***

## *Esperanta vivo*

En la jaro 1957 li partoprenis en la 30a SAT-Kongreso en Roterdamo. Tiel unuafoje alta ŝtatisto ĉeestis aranĝon de SAT kaj en la jaro 1967 Drees ankaŭ subskribis la faman UEA-proponon al UN.

Vilhelmo estis konvinkita, ĝisosta esperantisto. En 1954 li faris en Esperanto la malferman paroladon de la 39-a Universala Kongreso en Haarlem. Ekde 1962 li eĉ estis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

## *Aliaj honorigoj*

- La okan de majo 1948 Drees fariĝis honora doktoro de la Nederlanda Ekonomika Altlernejo en Roterdamo kaj en 1952 ankaŭ de la Universitato de Marilando (Usono).
- En la jaro 1953 li ricevis en Usono La Medalon de Libereco.
- La 22an de decembro 1958 al li donis reĝino Juliana la plej altan distingon de la Nederlanda Reĝlando, la Grandan Krucon de la Ordeno de la Nederlanda Leono.







Fonto: Google, Vikipedio

## Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

# Rememorigaĵo rilate la dekjaran forpason de Willem Drees (1998)




| | |
|---|---|
| Lando: Nederlando | Kvanto: 25 000 |
| Metalo: arĝento (Ag 925)<br>kupro (Cu 75) | Pezo: 25 g |
| Diametro: 38mm | Medalisto: Christoffel Van Draanen |
| Jaro: 1998 | Diko: 2,5 mm |

### Averso:

maldekstre: busto de Vilhelmo Drees, duone dekstren, sidante ĉe skribotablo

dekstre: vertikalaj surskriboj: “WILLEM DREES 1886-1988”

### Reverso:

meze: krifanta, stiligita leono; maldekstre glavo kaj sagofasko kun sep sagoj super la jarindiko 1998. Super la fasko: monfarejestra signo (Merkuro-stabo); sub la jarindiko: fasko + pafarko (medalista signo).

ĉirkaŭe - supre: “KONINKRIJK DER NEDERLANDEN” (= Reĝlando Nederlando)


ĉirkaŭe - sube: ambaŭflanke sep steletoj; sube - meze: 25 ECU

### Rimarko:

ECU = (Europian Currency Unit). Praeŭra unuo. Nuntempe (2025) ĝi valorus 0,000844 eŭrojn.

## S P I K U M A Ĵ O J & S U P L E M E N T O J

Radio Polonia 100 000a elsendo: dezajno de Jānis Strupulis










***Multan dankon al <u>la plej produktiva medalisto de esperantaj numismatikaĵoj</u>, Jānis Strupulis, kiu spontane sendis al la redakcio la kreivajn dezajnojn de esperanta plaketo, de ENA jam priskribita en jk.5, n-ro 4, p.6***

# *P O R   S P U R E M U L O J !*

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ (preskaŭ) nenion.* **HELPU NIN, SE EBLE!!!**

**40a enigmo**









ENA unuavice serĉas la dimensiojn (mezurojn, pezon…) kaj informojn pri la eldonkvanto; krome pri la medalisto, la metalo ktp, por povi sufiĉe komplete priskribi la medalon (adaptitan kiel insignon per plumbo kaj pinglo). MULTAN DANKON!

# UKIJO(E)



***Termino***

Ukijo: (japane 浮世絵, *ukiyoe*), estas termino por bildoj (desegnaĵoj) kun ĝenra temo, farataj per tekniko de japana tabulopreso (iam ankaŭ nomata “lignopreso”) de la 17a ĝis la 20a jarcentoj. La tekniko de preso ebligis amasan produktadon. Temis pri koloraj presiloj sur lignaj tabuloj, helpe de ŝablonoj. La temoj estis ĉefe la provinca vivo kaj la amuza fako (luktantoj de sumoo, korteganoj, artistoj ks). Nur reproduktaĵoj ja estis alireblaj al malpli riĉaj personoj, kiuj ne povis permesi al si originalajn laborojn de majstroj.

Ukijo instruas: *“**Vivu de tago al tago kaj ĝuu la vivon, liberigita de ĉiuj malproksimaj doktrinoj.**”*

***Etimologio***

La nomo *ukijo* (japane 浮世絵, *ukiyoe*) laŭvorte signifas bildon (japane 絵) de flosanta (japane 浮き) aŭ efemera mondo (japane 世), kiuj referencas al la plezurlokoj ĉirkaŭ Tokio kaj Kioto.

La signifo de la termino ukijo ŝanĝiĝis en la daŭro de la epokoj. Ĝi origine havis budhisman signifon kaj esprimis la paseman kaj efemeran naturon de la realo. Kvankam ĉi tiu signifo neniam tute malaperis, la termino iom post iom estis uzata metafore, por paroli pri vivmaniero de senripoza serĉado de efemeraj vivoĝojoj. Ukijo eĉ ricevis la signifon de "danĝera vivo", "kuraĝa vivo", "carpe diem".

La termino ukijo unue aperis en sia nuntempa signifo en eltiraĵo de la antaŭparolo al *Ukiyo monogatari* (Fabeloj de flosanta mondo), verko de Asai Ryōi, aperinta en 1665.

## *A S P E K T O J   D E   N U M I S M A T I K O*

# Numismatikaj mozaikoj (2)



**Laŭdo de tiu japana arta stilo per“Viro kaj virino” (*rarega eldono*!)**



Japana duscena mozaiko (1989) far Keiichi Uryu (1919-1992)

# V A L O R M A R K O J & V A L O R B I L E T O J

## Kolektistaj glivicaj kuponoj 2024

***Polaj specimenoj***










***Esperantaj specimenoj***
















***Rimarko: nur en la esperantaj specimenoj estas du distingoj: 00002 kaj WZÓR en du diversaj koloroj!***

# La Unua Monda Ekspozicio - Londono 1851

**Memoro stampita en malgrandan bronzan medalon**

*(helpe de Google-reto kompilis kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa Respubliko* panglotia@gmail.com*)*

*Medalo okaze de la monda ekspozicio 1851/ Mapo de Gr. Britio*






Ĝi estis la unua el vico de mondaj ekspozicioj en la kampoj de kulturo kaj industrio, kiuj iĝis tre popularaj en la 19a jarcento. Princo Albert de Saxe-Coburg-Gotha – ankaŭ la edzo de reĝino Viktorino de Britio – estis signife okupita en ĝia organizo. La ekspozicion ĉeestis konataj gravuloj, kiel Charles Darwin (1809-1882), membroj de la iama burbona reĝa familio de Francio kaj ankaŭ verkistoj kiel Charlotte Brontë (1816-1855) kaj Mary Ann Evans (1819-1880), konata sub la pseŭdonimo George Eliot.
La oficiala titolo de tiu ĉi ekspozicio estis: **La Granda Ekspozicio de Industriaj Verkoj de Ĉiuj Nacioj** aŭ **Ekspozicio de Kristalpalaco** aŭ **La Granda Ekspozicio**. Ĝi estis vere la unua grava internacia ekspozicio de industrio kaj kulturo de unuopaj landoj (de la 1a de majo ĝis la 15a de oktobro 1851).

***Bazaj informoj***

Post 1848 en la Reĝa Societo naskiĝis la ideo organizi internacian ekspozicion en Britio, kiu inkludus diversajn vivkampojn tiutempajn, kiel ekonomio, teknologio kaj ankaŭ kulturo. Artproduktado evoluigis tiun ideon kaj ricevis la subtenon de Princo Albert (1819-1861) mem, kiel prezidanto de la Royal Society of Arts (Reĝa Societo de Artoj). La edzino de princo Albert - reĝino Viktorino (1819-1901) - ankaŭ subtenis la projekton.
Princo Albert, kiel Prezidanto de la Reĝa Societo de Londono, postulis la ideon kiel sian propran kaj decidis efektivigi ĝin ĉiakoste. La brita publiko kontraŭbatalis tiun planon, sed la Ĉambro de Komunumoj (la Suba Ĉambro) aprobis la projekton. Malgraŭ daŭraj kaj streĉaj disputoj kun la tiama gazetaro, la celo estis atingita.
La Monda Ekspozicio estis organizita fare de komisiono gvidita de Princo Albert, kun sinjoroj Henry Cole, Francis Henry, Sir Charles Dilk kaj aliaj membroj de la Reĝa Societo kiel festado de modernaj industriaj teknologio kaj dezajno. La ekspozicio ankaŭ estis la brita respondo al la sukcesa franca Industria Ekspozicio okazigita en Parizo en 1844.

Loko por tiu celo estis akirita sude de Hyde Park en South Kensington. Tiu loko baldaŭ nomiĝis Albertopolis. La ekspozicio okazis en la menciita Kristalpalaco, grandega konstruaĵo el vitro (400 tunojn) kaj metalo (4 000 tunojn), dezajnita de Joseph Paxton (1801-1865). La konstruo, bazita sur la principo de kunigo de prefabrikitaj elementoj, okazis en rekorda tempo. Sur areo de 7,5 hektaroj estis preskaŭ 13 800 eksponantoj, preskaŭ duono el ili el pli ol 40 landoj, kaj pli ol duono el la Brita Imperio. La ekspozicio estis teme dividita en kvar sekcioj, nome: **krudaĵoj, maŝinoj, fabrikitaj produktoj kaj artaĵoj**.

***Ekspoziciantoj kaj iliaj ekspoziciaĵoj***

Kiel mi menciis supre, la eksponaĵoj venis ne nur el Britio, sed ankaŭ el ĝiaj imperiaj kolonioj, precipe Aŭstralio, Hindio kaj Nov-Zelando. Eŭropaj landoj kiel Danio, Francio kaj Svislando ankaŭ estis reprezentitaj. Entute estis ekspoziciitaj proksimume 13.000 ekspoziciaĵoj – ekzemple la mekanika teksilo de la franca mekanikisto kaj inventisto Joseph Marie Jacquard (1752-1834), same kiel diversaj kuirejaj aparatoj; stereofoniaj fotoj estis prezentitaj unuafoje kaj ŝtalproduktoj kiel rikoltilo, sendita el Usono.
John Dillwyn Llewelyn (1810-1882), kiu interesiĝis pri astronomio, botaniko kaj ankaŭ dediĉis sin al la fotarto, mirigis per sia metodo de "tuja" fotado, tiel ke oni havas siajn memorojn en la mano nur sekundojn post la registrado. Ni konas tiajn aparatojn kiel "polaroidojn".

***La kreinto de la medalo de la 1a Monda Ekspozicio, ĉi tie mem sur alia medalo***



*William Wyon (1795-1851)*

La kreinto de la medalo, William Wyon, naskiĝis en Birmingham en 1795 kaj de 1828 ĝis sia morto, la 29an de oktobro 1851, li estis oficiale la Ĉefa Gravuristo de la Brita Reĝa Monfarejo.

*LA EKSPOZICIA MEDALO*

*Materialo: bronzo (en la kolekto kun bela patino), Ø: 44 mm, pezo: 62,2 g, diko: 5 mm.*

*Averso: portreto de Princo Alberto maldekstre, H: R: H: PRINCO ALBERT PREZIDANTO DE LA REĜA KOMISIONO. (Mallongigo H:R:H: = Lia Reĝa Moŝto – tamen li ne estis kronita)*

*Subskribo sub la portreto: WYON, BA.*

*Reverso: globo ĉirkaŭita de laŭrobranĉetoj, kolombo super la terglobo, sur la rubando estas la teksto: EXPOSITOR kaj en la etikedo la teksto:*

*EKSPOZICIO DE INDUSTRIAJ VERKOJ DE ĈIUJ NACIOJ – MDCCCLI*

Se la multaj miloj da monerkolektantoj en Britio estus petitaj nomi la tri plej bonajn gravuristojn, kiuj iam kreis dezajnojn por britaj moneroj, estus tre verŝajne, ke William Wyon estus inter ili. Estas multo por admiri en lia produktiva kreado inter 1816 kaj 1851. Lia daŭra reputacio kiel tre erudicia medalisto estas ĉefe bazita sur la altaj kvalito kaj fideleco de portretoj de reĝino Viktorino sur moneroj kaj medaloj. Tio komenciĝis frue, ĉar la reĝino

unue "sidis" por li kiel juna dektrijara princino, kiam li kreis medaloportreton de ŝi por ŝia 18a naskiĝtago. Tio estis sekvita per portreto en malsupra reliefo por la novaj moneroj de la reĝino, kiuj venis en cirkuladon en la somero de 1838, kaj "diademoportreto“ por medalo memoriganta la viziton de la reĝino al la City en novembro 1837 (vidu la bildon maldekstre). Tiu portreto nun estas memorata kiel la portreto uzita por la 1840-datitaj Penny Black-poŝtmarkoj.)



*Reĝino Viktorino kun diademo*



*La "Young Head" de Reĝino Viktorino*




*Reĝino Viktorino kun la reĝinokrono*

Wyon kreis kronitan buston en la moda, gotika stilo en 1847, kiu estis uzita por la moneroj de tiu jaro kaj poste por la 1849-florinoj (vidu bildon dekstre). Preskaŭ samtempe li preparis alian diademitan portreton por medaloj, kaj finfine – baldaŭ antaŭ sia morto – kompletigis la kunigitajn portretojn de la Reĝino kaj Princo Albert por la medaloj de la Granda Ekspozicio de 1851 (*tiujn mi ankoraŭ ne trovis kaj kredas, ke ili estas tre maloftaj - notis J.K.*).
El la portretoj, tiu kiu estis aprobita por monfarado en 1838, sendube okupas lokon de fiero. Ĝi nun estas familiare konata kiel la "juna kapo" (la bildo centre). Ŝi estis tre flatita pro la maniero kiel la portreto de la Reĝino estis prezentita - "Majstro, mi ŝatas vian laboron sur mia vizaĝo", la Reĝino laŭdire diris al Wyon. Ŝi estis avino en siaj 60aj jaroj, do ŝi decidis, ke ŝiaj portretoj malaperu de la moneroj. Kompreneble, la portretokapabloj de Wyon ne estis limigitaj al bildigo de Reĝino Viktorino. Estis li, kiu gravuris la portretojn de Georgo la 4a kaj Vilhelmo la 4a, kvankam ili ne estis tute liaj propraj laboroj, ĉar ili estis modeligitaj laŭ la bustoj de la skulptisto Francis Chantrey (1781-1841). Multaj medaljonoportretoj, kaj privataj kaj oficialaj, atestas pri lia genio. Lia kapo de reĝino Adelajdo (1792-1849) – edzino de la brita reĝo Vilhelmo la 4a (1765-1837) por la kronada medalo de 1831 – estis kompletigita kun nekutima rapideco. Lia reputacio estis tiel konvinka, ke li estis komisiita prepari portreton de Maria la 2a (1662-1694) por portugala produktado, kio certe ne estis facila tasko. Pro la rapida maturiĝo de lia talento, neniu dubo estis pri lia kapablo dezajni monerojn kaj medalojn. Iliaj teknika kaj arta kvalitoj estas vere rimarkindaj.

***La redakcia de ENA denove kore dankas inĝ.Josef Kříž pro lia tre interesa artikolo***



*Kanhaya Lal Gauba*



UNCLE SHAM

*Being the Strange Tale of a Civilisation Run Amok*

by

Kanhaya Lal Gauba.

*With over forty Illustrations*

THE TIMES PUBLISHING COMPANY,

LAHORE (INDIA).

# NUMISMATIKA FORUMO

## 1. En "Numismatika forumo" de n-ro1 de 2025 sinjoro Legrand skribis:

"For la manaĉoj de niaj kontantaĵoj!"

Pri tiu temo mi trovis:

https://www.oenb.at/Presse/Pressearchiv/2024/20241219_1.html

En: https://www.salzburg.gv.at/themen/europa/eu-infothek/europa-spezial/europa-spezial-59/europa-spezial-59-05

Mi legis:

„Ein Problem, mit dem die Thematik zu kämpfen hat, sind laut EZB so genannte Fake-News. Darin werde oft über eine generelle Abschaffung des Bargelds gesprochen. Die EZB betont, eine Bargeldabschaffung sei ausdrücklich nicht vorgesehen."

Krome:

https://www.parlament.gv.at/dokument/XXV/E/125/fname_510049.pdf

Mia opinio: Mi uzas monerojn, monbiletojn, sed tre ofte la elektronikajn pageblecojn.

Mi havas ĉiam iom da monbiletoj kaj moneroj en mia dorsosako, ĉar ne ĉiu akceptas plastajn kartojn kaj tre malofte la pagado per plastaj kartoj ne funkcias.

Cetere pagado per moneroj estas emocia afero.

Sed grandaj kvantoj da kontanta mono estas risko: ŝtelo, perdo …

**Walter Klag, Vieno**

## 2. La usona dolaro: la "ora virbovego" de Wallstreet

***"Uncle Sham"*** *(= Onklo Honto) el 1929 de Gauba Kanhaya Lal, subtitole* ***"Stranga historio de amoka civilizacio"****, estis lia unua verko. Li reagis kolerege kontraŭ libro de Katharine Mayo, titolita "Mother India" (1927), kiu en la rondo de barataj intelektuloj kaŭzis sensacion, ĉar ŝi kritikis multajn aspektojn de la tradicia barata kulturo. La respondo de Gauba estis ampleksa, sarkasta kaj sardona atako kontraŭ preskaŭ ĉiu aspekto de la usona populara kulturo, kiu senkompate senmaskigas klas- kaj rasbatalon, kalumnion, korupton, libertinismon,...*

“La Ĉiopova Dolaro por usonanoj estas kvazaŭ privata dio. Komercado kolorigas ĉiun aspekton de la vivo, de la politiko, de la interrilatoj kun najbaroj, kun aliaj gentoj kaj religioj. Tiu Dolaro aĉetas la ŝtatan leĝdonadon, imunecon kontraŭ malagrablaj leĝoj, krome aĉetas la luksaĵojn de la ĉiutaga vivo, transformas edziĝon en burleskaĵon, patrinecon en malbenon ktp. La Dolaro aĉetas licencon, aĉetas virinojn kaj eĉ eŭropajn heredajn titolojn.

La prodolara manio superas ĉiujn ceterajn instinktojn. La dolara fato estas koncepto de la usonaj vireco kaj virineco. Se dolaroj ne estas rikoltendaj per la kovrado de intrigado, dolaroj venas de noktaj perfortaj eniroj de bankoj, politika fiagado, ŝtelado, kokrado kaj fraŭdo. Usonaj filmoj rakontas pri tio kaj pri pli multe. Ili montras al vi aliajn strategiojn por gajni dolarojn, krome kiel ĝenaj patroj estas flankenpuŝataj, kiel fratoj estas toksigataj kaj fratinoj vendataj. Ekzistas eĉ veraj rakontoj pri gepatroj, kiuj konspiras kontraŭ la propraj infanoj. Ĉie cirkulas firakontoj pri gepatroj malindaj, gepatroj kiuj neglektas aŭ misagas la idaron. Estas ankaŭ rakontoj pri kruelaj vicpatrinoj, havemaj onkloj kaj senkompataj bopatrinoj. Ne mankas raportoj pri patrinoj, kiuj forlasas bebojn ĉe nekonataj pordofostoj, esperante, ke filantropoj okupiĝos pri tiuj viktimoj. Certaj patroj dumnokte murdas la edzinon kaj la infanojn por eviti, ke ili mortu pro malsato kaj seneco. Aliaj rakontoj temas pri senskrupulaj gardistoj, kiuj misuzas frenezulojn, sed nur en Usono – se ni estas korekte informitaj – patro eĉ rajtas kolekti argumentojn kontraŭ sia filino, por sendigi ŝin al frenezulejo, por forrabi de ŝi heredaĵon (*Legu en “True Story Magazine”de junio 1928*!)

La averaĝa usonano fanfaronas pri sia kristanismo, sed probable en neniu lando de la mondo kristana moraleco estas tiel klare elkraĉata kiel en Usono. La difektoj de la sintenado, konsiderata kiel kristana, estas tiel kutimitaj en la usona vivo, ke oni ne rememoras la leĝaron de Moseo aŭ la filozofion de Jesuo. Tamen, kiam la konscienco terure tusas kaj ternas, la dolaro aĉetas absolvon. Usonanoj pagas kontribuojn por la konvertiĝo de liberpensuloj kaj paganoj kaj sekve kredas, ke la dolaro estos rezervilo por luksaj ĉambroj en la ĉiela paradizo…”




La agresiva profitema virbovo de Wallstreet en Vaŝingtono

Verkis: Kanhaya Lal Gauba Esperantigis: Bert

## *M E D A L I S T O J*

# 38 Alberto González Peretzol



Alberto González Peretzol estis diplomita pri teknika kaj industria desegnado. Kiam li havis 34 jarojn, li atingis la postenon de numismatika dezajnisto ĉe la Kuba Stampodomo, partoprenante samtempe, kiel skulptisto, multnombrajn projektojn. En 1997 li ricevis premion pro la plej bona dezajno de medalo okaze de la dudeka datreveno de la Kuba Stampodomo. Nuntempe li intencas emigri al Usono...



**La rolo de la pantografo en lia numismatika kreado**

La olda "artikulaciita paralelogramo", inventita antaŭ pli ol du jarcentoj, evoluis al maŝino, kiu ebligas reprodukti eĉ la plej etajn reliefojn. Ties celo estas reprodukti reliefajn bildojn, per etigo kaj engravuro en metalan objekton, kiu povas esti uzata kiel stampo por bronza disko, kiu funkcias en interŝtupa fazo.



**La stampo**

Jen la lasta fazo de la monerstampado. Post malmoligada procezo ĉiu el tiuj stampoj kapablas stampi milojn da moneroj. Meze sur la foto la kuba, esperanta monero de la Universala Kongreso, reverse.

Laŭ dezajno de Alberto Gonzales Peretzol,



Laŭ dezajno de Charles Edward Barber

***La redakcio de ENA kore dankas nian samideanon Fernando Paredes el Kubo pro la interesaj informoj!***



***Kelkaj bazaj ekzempleroj, sen aldonitaj signetoj…***



***Kelkaj ekzempleroj de diversaj tipoj, ĉiuj kun steleto(j) kaj kelkaj kun kroneto…***

# E L   L A   G A Z E T A R O

Ekzistas jenaj medaloj de la fega Esperanto-grupo de Antverpeno "La Verda Stelo" s.s.p.c.

<u>UNUA KATEGORIO: LA MEDALOJ PRI MERITO.</u>

1. la ununura medalo, kiun ricevis en Januaro 1932, okaze de la arĝenta jubileo de la Grupo, la prezidinto-fondinto S-ro Frans Schoofs.
   Laŭ speciala decido de la Administrantaro, S-ino V-ino Schoofs nun rajtas porti tiun medalon.
2. La arĝenta medalo pro merito, kiun ricevas la plej fervoraj anoj de la grupo, pro gravaj servoj daŭre faritaj al "La Verda Stelo".

<u>DUA KATEGORIO: LA MEDALOJ PRO FIDELECO.</u>

1. La bronza medalo de la grupo, post 10 jara membreco
2. La aldono de unu arĝenta steleto sur la rubando post 15 jara membreco
3. La aldono de dua arĝenta steleto post 20 jara membreco
4. La anstataŭigo de la bronza per arĝenta medalo post 25 jara membreco
5. La aldono de unu arĝenta steleto sur la rubando de la arĝenta medalo post 30 jara membreco
6. La anstataŭigo de tiu arĝenta per ora steleto post 35 jara membreco
7. La aldono de unu arĝenta steleto (malsupre de la ora steleto post 40 jara membreco.
8. La anstataŭigo de tiu arĝenta steleto per dua ora steleto por 45 jara membreco
9. La anstataŭigo de la arĝenta per orumita medalo post 50 jara membreco.

---

<u>TRIA KATEGORIO:</u> La plakedo pro "Veteraneco".

Kiun oni ricevas post 40 jaroj de fidela membreco"kiam oni estas konsideranta kiel "veteran(in)o".

**Honora Listo de la "VERDA STELO".**

**(Post la jarkunsido de januaro 1969)**

--------------

<u>**Medaloj "PRI FIDELECO"**</u>

<u>**ORA MEDALO**</u>

1917 S-ro Maurice Jaumotte

<u>ARGENTA MEDALO + ORAJ STELETOJ)</u>

1920 S-ino Marguerite Jaumotte
S-ino Lucette Faes
1922 S-ro Maurice Boeren

<u>ARGENTA MEDALO + UNA ORA + UNU ARGENTA STELETO.</u>

1926 S-ro August Faes
F-ino Maria Jacobs
S-ino Blanche Vermuyten
1927 S-ino Jeanne De Hondt
1928 S-ino Livina Mercka
1929 S-ro Hector Boffejon
S-ro Roger Jaumotte

**ARGENTA MEDALO + UNU ORA STELETO**

| | |
|---|---|
| 1931 | S-ro Henri Sielens |
| 1932 | S-ro Willy Boffejon |
| | F-ino Hélène Hofkens |
| | F-ino Mathilde Hofkens |
| 1933 | S-ro Henri De Hordt |

**BRONZA MEDALO + ARGENTAJ STELETOJ**

| | |
|---|---|
| 1946 | S-ino Felicie Jaumotte |
| | S-ino Rena Lecat |

Antaŭmilitaj esperantistoj kiujn oni konsidera kiel aliĝintaj en:

| | |
|---|---|
| 1946 | S-ro Charles Aalders |
| | F-ino Blanche Geers |
| | S-ro Jan Jacobs |
| | S-ino Bertha Jacobs |
| | S-ro Pierre Peelman |
| | S-ro Richard Torremans |
| | S-ro Remy Van Eynde |
| 1947 | S-ino Henny Jacques |

**BRONZA MEDALO + ARGENTA STELETO.**

| | |
|---|---|
| 1950 | S-ro René Balleux |
| | S-ino Nathalie Balleux |
| | S-ino Lea Bernaerts |
| | S-ino Germaine Debacker |
| | S-ro August De Backer |
| | F-ino Lisette De Winter |
| | S-ino Alice Govaerts |
| | F-ino Henriette Heyens |
| | F-ino Golda Leibovitche |
| | S-ro François Schellekens |
| | S-ro Eugeen Seghers |
| | S-ro Alfons Vercruyssen |
| | S-ro Jules Verstraeten |
| 1951 | F-ino Hortense Brack |
| | S-ino Rosine De Soete |
| | S-ino Mathilde Landerwyn |
| | S-ro Jozef Montmirail |
| | S-ino Louise Timmerman |
| | S-ro Wim Verdyck |
| | S-ino Johanna Verstraeten |
| | S-ro Jozef Verstraeten |
| 1952 | S-ino Maria De Winter Verscheren |
| | F-ino Françoise Jaspers |
| | S-ino Marie Louise Montmirail |
| | F-ino Clara Peeters |
| | S-ro Hubert Peeters |
| | S-ino Maria Philips |
| | S-ino Eugènia Thibau Toussaint |
| | F-ino Rita Thibau |
| 1953 | S-ro Hugo Jacques |
| | S-ino Rachel Van Eynde |
| | S-ro Karel Van Gompel |
| 1954 | S-ro Geërges Vanderschueren |
| | S-ino G.Vanderschueren |
| | F-ino Marit Montmirail |
| | F-ino Herlinde Montmirail |
| | S-ino Torremans |
| | S-ino Paula Debacker Sette |

**BRONZA MEDALO.**

| | |
|---|---|
| 1955 | F-ino Maria Blondeau |
| | F-ino Anny Enzlin |
| | S-ro Eugeen Paesmans |
| | S-ino Johanna Peeters |
| | F-ino Conny Schellekens |
| | S-ro Carlos Tytgat |
| | S-ro Paula Tytgat |
| | F-ino Linda Verdyck |

**BRONZA MEDALO.**

| | |
|---|---|
| 1956 | F-ino Elvire De Coene |
| | S-ro Luc De Marré |
| | S-ro Frans Govaerts |
| | S-ro Frans Peeters |
| | S-ino Maria Rousseau |
| | S-ro Albert Van Dessel |
| | S-ino Van Dessel |
| | S-ro Van Humbeeck Roger |
| | F-ino J.De Pauw |
| | S-ino H.Segers |
| | S-ro Montmirail Toni |
| 1958 | F-ino De Coene Hélène |
| | S-ro De Roover Hendrik |
| | S-ro De Roover Paul |
| | F-ino Tytgat Kristine |
| | F-ino Tytgat Ingrid |
| | S-ino Boffejon Annie |
| | S-ino Van Gompel Paulette |
| 1959 | S-ino De Roover Paula |
| | S-ro Wim De Smet |
| | S-ro Gaston Roels |
| | S-ro Mathieu Du Bois |
| | S-ro Jos Van Steen |
| | F-ino Elisabeth Creemers |
| | F-ino Viviane Jaumotte |

## HONORA LISTO de LA VERDA STELO

(Post la jarkunsido de 1969 (januaro).

### MEDALOJ PRI MERITO

| | | |
|---|---|---|
| ORA medalo | S-ro Maurice Jaumotte | (1952) |
| ARGENTA medalo | S-ro Hector Boffejon | 1952 |
| | S-ro August Faes | 1932 |
| | F-ino Maria Jacobs | 1932 |
| | S-ro G.Van den Bossche | 1932 |
| | S-ro Hector Vermuyten | 1932 |
| | S-ino Lucette Faes | 1936 |
| | S-ino Henri Sielens | 1936 |
| | S-ino Marg.Jaumotte | 1937 |
| | S-ro Karel Ameryckx | 1957 |
| | S-ro René Balleux | 1957 |
| | S-ino Lea Bernaerts | 1957 |
| | F-ino Lisette De Winter | 1957 |
| | F-ino Hélène Hofkens | 1957 |
| | F-ino Mathilde Hofkens | 1957 |
| | S-ino Henny Jacques | 1957 |
| | S-ro Roger Jaumotte | 1957 |
| | S-ro Jozef Montmirail | 1957 |
| | S-ro Pierre Peelman | 1957 |
| | F-ino Henr.Toussaint (post morto) | |
| | S-ro Jules Verstraeten | 1957 |
| | F-ino Elza Van der Weken | 1958 |
| | S-ro Luc De Marré | 1951 |
| | S-ro François Schellekens | 1961 |
| | S-ro Remy Van Eynde | 1961 |
| | S-ro Hendrik De Roover | 1963. |

Plakedoj por Veteranoj

Post 40 jaroj membreco.

------------

| | | |
|---|---|---|
| S-ro | Maurice Jaumotte | 1957 |
| S-ino | Marguerite Jaumotte | 1963 |
| S-ino | Lucette Faes | 1963 |
| S-ro | Maurice Boeren | 1963 |
| S-ro | August Faes | 1965 |
| F-ino | Maria Jacobs | 1965 |
| S-ino | Blanche Vermuyten | 1967 |
| S-ino | Jeanne De Hondt | 1967 |
| S-ino | Livina Merckx | 1968 |
| S-ro | Hector Boffejon | 1969 |
| S-ro | Roger Jaumotte | 1969 |

Fonto: IEspA (Diest/ Belgio)

***Multan dankon denove al nia membro Marc Vanden Bempt***

# *T E R M I N A R O*

## Alfabeta listo (41)

**aĝio:** *ankaŭ nomata "premio". Ĉi tiu estas aŭkcia kotizo aldonita al la aĉetprezo de aŭkcia objekto, kutime kiel procento de la prezo. / Pozitiva diferenco inter la nominala valoro kaj la eldonprezo de la produktanto.*

**akumuli:** *uzi parton de plusvaloro por pligrandigi la produktokapitalon*

**alfenido:** *alojo el kupro, zinko, nikelo + 20 % da arĝento, imitante arĝenton*

**amortizi:** *kvitigi per seria pagado*

**arĝentumo:** *> alfenido*

**aversoreversumi***: ŝancelekti per ludo "averse-reverse", uzante suprenĵeton de monero per dikfingro*

**denombrada signo:** *simbolo kiel buleto aŭ striketo por disigi la elementojn de monera aŭ medala surskribo. Ankaŭ uzata por marki la diversajn elementojn en listo (listosigno)*

**fandado:** *monfarado per fluidigita metalo aŭ alojo, do ne per pregado ĉe monfarejo*

**frontodorsumi:** *> aversoreversumi*

**inicialsigno:** *signo por indiki la komencon de ĉirkaŭskribo sur monero aŭ medalo*

**interpunkcio:** *signoj por apartigi vortojn de la ĉirkaŭskribo aŭ de aliaj surskriboj de monero aŭ medalo. Kutime pro manko de spaco inter la vortoj kaj pro ofte uzataj diversspecaj mallongigoj.*

**krucsigno:** *mezepoke, kutime estis uzata signo en formo de kruceto por indiki la komencon de ĉirkaŭskribo sur monero aŭ medalo*

**kvitigo:** *amortizo de ŝuldoj*

**monelmetalo:** *> monelo*

**monelo:** *alojo precipe el nikelo kaj kupro, tre rezista al mekanikaj fortoj kaj al korodo*

**monfarado:** *produktado de moneroj en monfarejo*

**monometalismo:** *unumetalismo, do ne alojo aŭ kombino de metaloj kiel en eŭro*-*moneroj*

**partopagi:** *> amortizi*

**ŝekelo:** *en la antikva Mezopotamio pagilo; ne monero, sed buleto je 8,33 gramoj da arĝento / En Israelo nuntempa kuranta monunuo*

**tondi:** *la malsupran parton de la bildo apartigi per horizontala linio, por aldoni informaĵon*

***R E T P O Ŝ T O***

de vi por ni!

## Reagoj kaj konversacioj

*19.01.2025 23:27*

*Kara amiko Jozefo!*

*Espereble vi povos denove trovi iom da (liber)tempo por provlegante helpi la unuuran numismatikan fakgrupon en la historio de Esperanto (ĉu ankaŭ vi konstatis ke la majusklo en tiu vorto lastatempe apenaŭ estas uzata?).*

*Kun iom da dubo mi lanĉas la 12an jarkolekton, ĉefe pro mia aĝo (en majo 77!) kaj ankaŭ pro miaj kreskantaj sanproblemetoj kaj veraj sanproblemoj. Do, eble estos la lasta jarkolekto, sed la estoncecon neniu povas prognozi, ĉu ne?*

*Ĉiel, denove mi tutkore antaŭdankas vin pro via kunlaboro.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

22.01.2025 15:22

Kara Bert,

mi komprenas, ke kun la aĝo venas ĉiam pli da problemetoj: mia bopatrino jam estas trans 92, do mi vidas ĉiutage tutan spektron de tiaj malagrablaĵetoj. Kun la aĝo venas ne nur saĝo, mi diras kun la vortoj de Zamenhof, ja aĝo tro matura ne estas plezura aŭ aĝo maljuna ne estas oportuna.

Malgraŭ ĉio mi esperas, ke vi ankoraŭ havos forton kaj emon plu plugi ĉi tiun novalon. Do mi deziras por la nova jaro fortikan sanon, bonan humoron por via beninda agado! Kaj ni esperu!

Amike: Jozefo

02.02.2025 8:23

Kara Bert,

kiel vi vidas, mi sendis la provlegitan revuon jam la 22an de januaro. Kaj mi ne ricevis avizon, ke ĝi reĵetiĝis. Nun mi sendis ĝin per wetransfer, mi kredas, ke tio estas pli sekura vojo ol simpla anekso.

Dank' al Dio, mi estas sana, do krom la kutimaj malfacilaĵoj estas nenio malbona, kion ankaŭ al vi mi deziras

amike: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.02.2025 20:37

Miaj gekaruloj!

Tre feliĉigis min via bondezirkarto kaj aldonita unuataga koverto (flustre dirite: ĉu vi scias ke mi ne posedas ĝin? Dankon pro la pliriĉigo de mia kolektaĵo!)

Tuj mi respondas al via unua demando: *Kiel vi fartas aktuale?* Tre malbone, dankon, precipe psike! La tuta januara monato alportis malbonaĵojn al ni. Nur Pino, pli-malpli, sufiĉe bonfartas. Mia fratino jam ekde la unuaj januaraj tagoj ekmalsaniĝis kaj ĝis nun oni ne malkovris la kialon, tial mi denove iradas tien kaj reen de Triesto al Monfalcone kaj samtempe devas dungi vartistinon por Pino. Stagnas ankaŭ la proceduroj pri la heredaĵo de Barbara, tial la financa situacio por mia fratino estas malbona - en la senco ke ŝi tiom turmentas sin mem (kaj min!) kvankam - danke al Dio! - nek mi kaj Pino, nek ŝi estos pro tio devigitaj dormi sub la pontoj! *Permesu, ke mi ŝercu, alimaniere mi freneziĝos!*

Mi estis kontenta pri la retkunveno, vere, mia sento estis, ke oni deziras la pluekzistadon de nia ELF-AREK!

Vi skribis: *Bonvolu legi la redakcian artikolon en la nova numero de ENA!* Ĉu tiun en la 4-a numero de 2024-a jaro?

Se vi havas ion jam verkitan preta por nia LVL, bonvolu sendi. Morgaŭ aŭ postmorgaŭ vi ricevos mian cirkuleron, sekve vi komprenos la sencon de ĉi mia peto.

Forte kaj amike/filatele/numismatike

via Elda

08.02.2025 19:26

Miaj tre karaj Vivi kaj Bert!

Mi kortuŝiĝis kaj eĉ ploretis, legante vian *De ni por ... ni!* en la januara EN-o. Dankon pro viaj vortoj, amike sinceraj kaj bonkoraj, kaj tre konkretaj rilate al nia tre *amata ĉevaleto*. Tiu bela enkonduko dismalfermas la kovrilon de kofro entenanta numismatikajn perlojn kaj juvelojn, per kiuj vi plej fascine ornamas la iom kaŝitan E-historion en kampoj numismatikaj (samkiel tiu filatela kaj esperantaĵa).

Vi Bert, krom estis frata amiko, estas puto senfina de klero, de emo al esplorado en malmulte konata kampo, la iniciatoro de fako ĉiam neglektata kaj neglektota de la esperantistaro. Per via brilanta torĉo vi lumigas la ankoraŭ esplorendan kaj esplorindan vojon al malkovro de aginta kaj aganta esperantistaro, kun la celo prezenti kiel plej eble komplete la grandiozan rolon de nia antaŭularo. Vi kaj via Vivi estas eksterordinaraj kaj mi fieras esti konsiderata de vi ambaŭ via amikino. Ankoraŭfoje, dankon!

Bedaŭrinde ne ankoraŭ venis por mi iom pli trankvilaj tempoj, ĉar mi devas dediĉi multan parton de mia tempo al mia fratino, kiu - vi ja scias - loĝas je pli ol 30 km de mia Triesto - kaj jam de pli ol unu monato malsanas. Plie estas mia Pino, kiu bonŝance lastatempe sufiĉe bonfartas, post la enhospitaliĝo pro bronkopulmito kaj korinfarkto. Mi estas en plena krizo, psika kaj fizika, kaj ne tiom rozeta mi vidas mian estontecon. Mi sentas min kiel tien-kaj-reen-a laboristino!!!

Energio estas jam for, sed mia volo estas forta, mi volas iel eliri el tia situacio, kaj unu el la manieroj por tion sukcesi estas venigi mian fratinon al Triesto. La vojo estas plena de ŝtonegoj kaj fosaĵoj, sed mi esperas, ke...

Unue mi kontentas, ĉar sukcesis miaj klopodoj reaperigi en *Il Postalista* la artikolon it-esp pri E-Literoj.

Mi ekskribis cirkuleron, per kiu mi atentigis la liganojn pri la estonteco de nia ELF-AREK; ĝin submetis al kontrolo de James, sed li evidentigis al mi, ke ĝi estas iom tro kaosa por plene esti komprenata. Do, nun mi ŝanĝos ĝin, sed al vi mi antaŭdiras tion rilatantan rekte la redaktadon de LVL. La suba parto, kursive, atingos ankaŭ la aliajn liganojn.

Jen ĝi:

*Intertempe mi kontrolis la aprilan /LVL/2024, kiun -pro drasta limigo de mia libera tempo- mi estis devigita flankenmeti. Surprize (mi ne plu memoris tion!) mi rimarkis, ke ĝi estas duonpreta kaj krome materialo estas sufiĉa por plenigi la 24 paĝojn. Tamen mi jam pensis, se vi konsentos, ke surkovrile la*

*aperdato estu Aprila-aŭgusta 2024. Kaj io simila estos por la posta LVL, nome ĝi aperos por la periodo Decembra 2024-Aprila 2025, tiel ke ni povu reakiru la kutiman aper-ritmon, tri-foje jare: aprile - aŭguste - decembre.*

*Kion vi opinias? Se vi akceptas ĉi proponon, estas la momento por pretigi novajn artikolojn, kiuj okupos la spacojn de tiu decembra- aprila, dume mi finos la apr/aŭg.*

El la supraj frazoj vi komprenos, ke por la momento vi ankoraŭ ne sendu al Michel la artikolojn. Se malfeliĉe miaj streboj, redakti nian organon, fiaskos, tiam ni revizios la planon.

Mi kontrolis kaj la supra artikolo aperis en LVL-188, sed la duan mi ne havas. Dankon se vi sukcesos pretigi ion, kiel rezervo.

Tamen mi havas la artikolon de vi verkita kunlabore kun Marc Vanden Bempt: *Poŝtkarto de Harold Bolingbroke Mudie (1907)*kiu ankoraŭ ne estis publikigita (se mi ne eraras, tamen mi kontrolos, por esti certa).

Nun mi skribos ankaŭ al Michel Basso, ĉar ankaŭ li atendas ankoraŭ mia reago. Mi estas malfidinda persono!

Brakumante vin ambaŭ kun granda amemo kaj danko pro via subteno,

Amike, viaj Elda kaj Pino

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.02.2025 21:30

Multan dankon pro la freŝa numero!

Alfred

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.02.2025 21:30

Kara Bert!

Numismatan dankon pro la numero unua de 2025!

Amike salutas Walter, Vieno

04.02.2025 10:38

Kara Bert!

En N U M I S M A T I K A F O R U M O sinjoro Legrand skribis:

"For la manaĉoj de niaj kontantaĵoj!"

Pri tiu temo mi trovis:

https://www.oenb.at/Presse/Pressearchiv/2024/20241219_1.html

Kaj en https://www.salzburg.gv.at/themen/europa/eu-infothek/europa-spezial/europa-spezial-59/europa-spezial-59-05

mi legis:

„Ein Problem, mit dem die Thematik zu kämpfen hat, sind laut EZB so genannte Fake-News. Darin werde oft über eine generelle Abschaffung des Bargelds gesprochen. Die EZB betont, eine Bargeldabschaffung sei ausdrücklich nicht vorgesehen."

Krome:

https://www.parlament.gv.at/dokument/XXV/E/125/fname_510049.pdf

Mia opinio: Mi uzas monerojn, monbiletojn, sed tre ofte la elektronikajn pageblecojn.

Mi havas ĉiam iom da monbiletoj kaj moneroj en mia dorsosako, ĉar ne ĉiu akceptas plastajn kartojn kaj tre malofte la pagado per plastaj kartoj ne funkcias.

Cetere pagado per moneroj estas emocia afero.

Sed grandaj kvantoj da kontanta mono estas risko: ŝtelo, perdo …

Amike salutas Walter

20.02.2025 11:11

Eble vi ne konas ...

https://www.ebay.de/itm/226507415976?_skw=Esperanto&itmmeta=01JMHD52WW4PXG7RFRQY7P4PVF&hash=item34bce4e1a8:g:WrUAAOSw6ednZxAZ&itmprp=enc%3AAQAKAAAA4FkggFvd1GGDu0w3yXCmi1e0UNwGCGuA7GEweH%2BJ4vo%2BM4%2FHApqYWiChDL22P%2BBrBEfViAwgbJLUX0SjU0DrQMKAK28sBV9%2FkN91FWgzNYaYhLw04fzO4Y8rMFI20QZu%2F4xg5jvOPqjXMJP5pHrCpB5ACBOZf6RPzgxhtDhIbzZ%2F9m9y7%2BQAjn9nZ3x4zW6vvUEL1uB5kEys5kiRojnvFXFof2pk9ZW2BQDfiyZ%2BV5BND9JQLhrkMeeLVeMPcO3xQR4cWz7ngmT0nWeWDnr8yHNbrznCWmFYe2odv0sbLmMi%7Ctkp%3ABFBM1q6UraRl



Amike salutas Walter

*21.02.2025 17:38*

*Multan dankon, Walter! Mi aldonos la britan medalon al la rubriko "Por spuremuloj" por eble kapti informojn pri la diversaj mezuroj!*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2025 2:05

Kara Bert

Dankon pro la nova revuo!

Vi trovos ĝin ĉi tie: ena-j12n1-202501.pdf

Elkorajn salutojn!

Albert Claesen

vikiflandrio.alcl.be

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2025 7:00

Elkoran dankon pro la revuo!

Bardhyl Selimi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2025 10:13

Kara Bert,

mi multe dankas al vi pro la nova numero de ENA-revuo!

Amike,

Velimir Piškorec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2025 15:18

Kara Bert!

Dankon pro la fidela riĉigo de membraro de la diskutlisto medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com

per Via brila ENA-revuo.

Ni deziras al Vi bonan sanon.

Kun plej amikaj salutoj

Ludoviko Molnár kaj Julinjo Farkas

membroj de la 56-jara Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2025 20:30

s-ro Bert Boon !

Koran dankon pro la nova numero!

Amike,

Jawaid Eahsan

Pakistano

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.02.2025 12:10

Kara Bert,

dankon pro la sendado.

Mi elprintos la aktualan eldonon de la ENA-revuo kaj metas ĝin al la libroservo, kiun mi kunportos al renkontiĝoj de GEA.

kore

Andreas Diemel

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

09.02.2025 11:45

Kara Bert,

mi sendas al vi tekston, kiu rilatas al la Unua Monda Ekspozicio en Londono 1851, al kiu mi posedas bronzan medalon (vidu en almetaĵo), Vi mem decidu, ĉu vi povas utiligi la tekston. Se la teksto estas tro longa por via uzo, vi povas mallongigi tiel, ke ĝi ne perdu ĉefan sencon. Se vi mem ne utiligos ĝin, do bv. informi min, ke mi povu oferti ĝin al alia redakcio.

Amike salutas vin

Josef Kříž

10.02.2025 11:35

Bv. Bert,

mi devis ripari titolojn sub medaloj tute je la fino de ĉi tiu teksto. Tial mi sendas ĝin ripete. Pardonu. Mi atendas vian respondon.

Dankas Josef

*11.02.2025 21:57*

*Kara Josef!*

*Multan dankon! Volonte mi konservos la tekston por la rubriko "Historiaj aspektoj". Eble mi forigos la etan bluan tekston…*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.03.2025 22:20

Kara Bert!

Jen propono:

Kombinu katalogon kaj vortaron por ENA!

Eldonu unue katalogeton kaj vortareton.

Poste ni povos plukonstrui.

Kore salutas Walter

*31.03.2025 11:45*

*Kara Walter!*

*Bona ideo plukonstrui senĉese. Ambaŭ kresku samtempe. Unuavice la* **baza** *katalogo… Por aranĝi kaj korekti la vortaron helpos min i.a. tre sperta samideano, kiu kutime provlegas nian revuon.*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

***A N O N C O J***

***&***

***E V E N T O J***

# Forpasis Renato Corsetti 1941 - 2025

*de Libera Folio je 2025-02-01 en movado, UEA*

**En la aĝo de 83 jaroj forpasis Renato Corsetti, iama prezidanto de TEJO kaj UEA kaj honora prezidanto de ambaŭ asocioj. Corsetti ĝis sia forpaso restis la plej aktiva ano de la komitato de UEA. Li estis ankaŭ membro de la elekta komisiono de UEA, kiu preparas la elekton de la sekva estraro.**



**Renato Corsetti dum vigla diskuto pri la statuto de UEA dum komitata kunsido en julio 2011. Foto: Peter Hauser.**

**Renato Corsetti dum la lastaj monatoj fartis malbone kaj estis regule flegata en malsanulejo. Sabate la 1-an de februaro lia edzino Anna Löwenstein en la retlisto UEA-membroj publike respondis al esperantistoj, kiuj petis informojn pri lia farto:**

**”Antauhieraŭ li telefonis al mi en la vespero, kaj ni tre bone interparolis. Lia voĉo estis pli forta, kaj ĝenerale li ŝajnis farti pli bone. Do mi estis tre kuraĝigita, kaj komencis esperi, ke finfine li superis la problemojn. Kaj tamen, kiam mi revenis al la malsanulejo la postan matenon (hieraŭ), li estis nekonscia. Li restas nekonscia ĝis nun.”**

**Tuj post kiam ŝi skribis la leteron, en kiu ŝi petis esperantistojn sendi kuraĝigajn mesaĝojn, ŝi informis, ke Renato forpasis.**

**Renato Corsetti naskiĝis en Romo la 29-an de marto 1941, kie li dum multaj jaroj laboris kiel bankdirektoro. Ekde 1990 ĝis sia emeritiĝo en 2011 li estis profesoro pri psikolingvistiko en la universitato La Sapienza, kie li mem studis.**

**Esperanton li lernis en la komenco de la 1960-aj jaroj. Li aktivis en TEJO, kies prezidanto li estis 1971–1973. Ekde 1973 li estis honora prezidanto de TEJO.**

**Poste li dum jardekoj diversflanke aktivis en UEA, kiun li prezidis de 2001 ĝis 2007. Li estis membro kaj sekretario de Akademio de Esperanto. Li estis honora membro de UEA ekde 2011.**

**En 2023, dum la Universala Kongreso en Torino, la estraro de UEA nomis lin honora prezidanto de la asocio. Samtempe kiel honora membro de UEA estis elektita lia edzino Anna Löwenstein.**

**Kun Anna Löwenstein Renato Corsetti havis du komunajn filojn. Ĝis 2015 li loĝis en Palestrina apud Romo, poste en Londono.**

# Nova monero 5000 Steloj el plateno

La Aŭstria Monerfarejo AG pregis 2025 platenan moneron
kun nominala valoro de 5000 Steloj.

**Eldonkvanto: Nur 25 ekzempleroj.**

Materialo pura plateno 999,5/1000.
Diametro 30 mm ± 0,1 mm.
Maso 15,56 g ± 0,1 g (½ unco).




**Prezo: 1200 €**

Pregita en ringo, ripa rando, stampita, kvalito"prooflike".
Pakita en travidebla akrila kapsulo.

Averso:

5000 STELOJ 2025 -ESPERANTO - UNU UNCO
DA PURA PLATENO 999,5 - Steloj.
Platenstampo laŭ Aŭstria leĝo Pt 950.

Reverso:

Motivo prenita el 50 Steloj "JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO 1887-1971"
Informoj kaj mendoj: Walter Klag, Vieno, esperanto@chello.at

# Nombro de la Stelo-Moneroj

| Nombro de la Stelo-Moneroj | Tuta nominalo |
|---|---|
| 5000 je 1 Stelo el ne-nobla metalo 1959 | 5000 Steloj |
| 5000 je 5 Steloj el ne-nobla metalo 1959 | 25000 Steloj |
| 5000 je 10 Steloj el ne-nobla metalo 1959 | 50000 Steloj |
| 1000 je 25 Steloj el arĝento 1965 | 25000 Steloj |
| 5000 je 25 Steloj el ne-nobla metalo 1965 | 125000 Steloj |
| 10 je 25 Steloj el oro | 250 Steloj |
| 3000 je 1 Stelo el plasto 2012 | 3000 Steloj |
| 3000 je 3 Steloj el plasto 2012 | 9000 Steloj |
| 3000 je 10 Steloj el plasto 2012 | 30000 Steloj |
| 1000 je 100 Steloj el arĝento 2018 | 100000 Steloj |
| 300 je 50 Steloj el arĝento 2020 | 15000 Steloj |
| 25 je 5000 Steloj el plateno 2025 | 125000 Steloj |
| | |
| Sumo 31335 moneroj | 512250 Steloj |
| | |
| Sumo 29000 moneroj el ne-nobla metalo | 247000 Steloj |
| Sumo 2300 Steloj el arĝento | 140000 Steloj |
| Sumo 10 je 25 Steloj el oro | 250 Steloj |
| Sumo 25 je 5000 Steloj el plateno | 125000 Steloj |
| | |

2025 01 23

**NianWalter Klag ENA kore dankas pro la informoj!**

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.
La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 170 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial onirajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

## Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
bert.boon@skynet.be